



FEBRUARO 2015



*La «Espéranto-Gironde» Informilo*

N° 142

# GOJE KANTU en 2015



**VENONTA KUNVENO  
DIMANĈON LA 15an de FEBRUARO  
EN CENON PALMER  
JE LA 10a**

**ESPERANTO-GIRONDE**  
**Réunion du 23 novembre 2014**  
**Centre Palmer, 10h-17h**

**Présents** : Bernard, Morine, Marcelo, Gloria, Monique, Christiane, Michel, Janine, Yannick, Pierre Labbé (Marie-Thérèse Lafage reste quelque temps. A partir de 13h30 : Isabelle).

**Excusés** : Joël, Rose, Claudine

### **1. Edition d'un CD de Morine**

Ce sera un CD de chants en plusieurs langues, financé par Morine et Espéranto-Gironde. (Voir annonce p.15)

**Marcelo** assure que chez Jean-Paul Nogues, les frais de studio seront maîtrisés.

**Christiane** suggère de faire une souscription.

**Morine** : Il faut trouver une guitare, un saxo et un violon. Souhaiteront-ils être payés ? Il semble qu'une centaine de disques pourraient suffire, à vendre lors des concerts.

**Marcelo** : Le CD doit être prêt pour Lille. Il faut l'enregistrer bientôt. En général, on édite au minimum 300 CD, mais 500 ne coûtent pas beaucoup plus cher. Il faut établir un budget.

### **2. Les sites d'Espéranto-Gironde et des Kompanoj**

**Yannick** : Il est préférable de faire deux sites distincts, pour augmenter les capacités de stockage. Les sites seront créés avec SPIP.

Pour le site des Kompanoj, voir p.7.

Nous répétons quelques chansons avant et après le pique-nique.

### **3. Stages de chansons**

**Marcelo** : - Un stage est prévu avec les Kompanoj à **Grésillon** au **week-end de Pâques (4 au 6 avril)** (en même temps qu'un stage d'Interkant').

- Un autre est programmé avec Fabrice à **Dijon** du **10 au 12 avril**.

- Un autre est prévu à **Limoges** avec les Kompanoj les **18 et 19 avril**.

Un week-end reste à programmer à **Bouresse** en **mai-juin**.

### **4. Divers**

- **Marcelo** : Le LKK met à disposition d'Espéranto-Gironde une somme de 3000€ en tout pour les frais d'organisation. Cette somme est pour l'essentiel utilisée à rembourser les frais de déplacement de FaMo et Bernard Legeay aux différents stages.

- **Janine** doit envoyer à *Espéranto-info* et au *Monde de l'espéranto* le compte rendu du stage d'octobre.

## 5. Répétition en plein air

Nous répétons, avec l'accordéon d'Isabelle, à l'extérieur de la salle. Nous pouvons apprécier les changements concernant notre rapport à l'instrument et la portée de nos voix !

*Janine*



### LA KOMPANOJ DANKAS

**K**orajn dankojn al la Esperanto-grupo de Angers pro ĝia 50-eura donaco por partopreno en la financado de la surstrata kunkantado en Lillo!



### NI FUNEBRAS

#### Forpasis Gaston Hérard

**K**omence de aŭgusto forpasis nia amiko Gaston Hérard. Li estis kremaciita en Bergerac kaj liaj cindroj estis entombigitaj en la tombejo de Galgono. Tie, Annick, Pierre-Yves, Jean-Claude kaj mi ĉeestis por saluti lian edzinon Jeanne.

Gaston naskiĝis en 1920. Li laboris kiel fervojisto en diversaj lokoj sed li finis sian karieron en nia regiono. Li malkovris esperanton kiam li estis sufiĉe juna, sed pro la laboro kaj pro la familia vivo (4 infanoj) li ne trovis tempon por efike lerni. Kiam li fariĝis emerito, li aĉetis domon en Galgono.

Kulturo multe interesis lin; li ŝatis librojn kaj sufiĉe helpis por instali la komunuman bibliotekon. Li bele desegnis kaj iniciatis desegno-kurson. Kaj kiam loka esperanto-grupo aperis, li tuj aliĝis kun sia edzino. Tre agema, li regule ĉeestis en nia semajna kurso kaj efike helpis, ĉu por akcepti alilandajn esperantistojn, ĉu por organizi niajn piedajn raliojn. Li plurfoje partoprenis en niaj staĝoj en Artigues en la jaroj 2000. Li estis membro de Esperanto-Gironde kaj ankaŭ de la nacia esperantista asocio por fervojistoj.

Okaze de la Sat-Amikara kongreso de 2007, li ankoraŭ helpis, portante al ni grandan verdan stelon el ligno, farita de li. Tiu stelo staris ĉe la enirejo de la akceptejo.

Li ĉiam montris sin diskreta kaj efika. Ni perdas tre afablan amikon kaj diligentan samideanon.

*Joël Lajus*

**ESPERANTO-GIRONDE**  
**ZAMENHOF-TAGO**  
**14-AN DE DECEMBRO 2014**  
**EN CREON CÔTE MORINE**

**C**eestas: Bernard, Rose, Christiane, Michel, Speranza, Monique, Marcelo, Yannick, Janine, Morine, Joël, Bruno. Alvenas Marie-Thérèse Lafage, kiu foriras post la manĝo.

**Senkulpigita:** Claudine

**Bernard:** Estis intervjuita pri Esperanto-Gironde en la gazeto Courrier de Gironde. (vd. p.6)

**Marcelo** okaze de la Zamenhof-tago, prezentas bildaron pri Zamenhof. Ni povas vidi kelkajn fotojn de la Bulonja kongreso de 1905, interalie de Alfred Michaux (1859-1937), kiu ludis gravan rolon en la estigo kaj organizo de la Unua Kongreso. Interesa ankaŭ estas la deklaro de Zamenhof, en sia fama *Letero al Michaux*, publikigita en *La Revue de l'Espéranto*, la 18an de majo 1905: «Uzante la okazon, mi nun ripetas publike tion, kion mi jam ofte diris kaj skribis private: mi kore petas ĉiujn esperantistojn, ke en siaj leteroj al mi aŭ en sia buŝa parolado kun mi, ili neniam uzu la vorton "majstro", kiu estas al mi malagrabla, sed ili ĉiam uzu simple la vorton "sinjoro"».

Ni kaptas la okazon diferencigi «majstro» kaj «mastro», laŭ la difinoj de PIV.

Cetere **Marcelo** informas nin pri diversaj malfacilaĵoj, kiuj klarigas, ke la Lilla projekto ne progresis tiel kontentige, kiel esperite.

Tamen la adreso de la retejo estu disvastigita antaŭ la jarfino. Ĉiuj kanzonoj estos alireblaj kun tekstoj, partituroj, muzikoj...

La surstrata kunkantado estas preskaŭ preta. Male, la sursceneja spektaklo estas multe pli malfacila pro prepari. Estas tro multe por zorgi, kaj tro multe da laboro por Marcelo sola.

Tout est différent de ce que l'on avait pensé faire au début. Il reste de nombreuses incertitudes. On ne sait pas encore ce qui se passera effectivement sur scène le dimanche soir.



## **Programme prévisionnel du spectacle sur scène :**

- 1<sup>ère</sup> partie : Il était prévu que Morine et Isabelle présentent des morceaux qui étaient chantés en 1905. Cela ne pourra se faire. Elles présenteront des chants qu'elles puiseront dans leur répertoire.

- 2<sup>ème</sup> partie : Le congrès de Lille devait proposer une soirée non pas nationale, mais plurinationale, avec Nikolin' et Laŭrenzo (de Belgique). Ils n'ont pas encore confirmé leur participation.

- 3<sup>ème</sup> partie : Brel - Janine : sketch à partir de *Ces gens-là*

- Fabrice : Chansons de Brel en espéranto

- Fabrice, Nikolin', Morine, Marcelo : *Kiam restas am'nur*

- 4<sup>ème</sup> partie : Chansons du spectacle dans la rue, avec un chanteur sur scène (Marcelo : *La Festo*) accompagné par le chœur des Kompanoj.

Fil rouge du spectacle : Le Géant des Flandres Naturamiko, sur scène, avec la voix de Yannick depuis les coulisses. Yannick chantera *La Esper' senlima*. Problème : chaque géant mesure 4,50 de hauteur et a un guide qui lui est attaché. Le guide du géant Naturamiko est le président des Amis de la Nature, qui n'est pas espérantiste. Quelle sera la maniabilité du géant sur scène ?...

Il était prévu aussi de faire participer Jacques Yvart sous forme d'une projection vidéo.

A l'heure actuelle, on ne sait pas ce qui va aboutir, de tout ce qui était prévu.

Ceux qui s'engagent à aller à Lille doivent aussi s'engager à assister aux répétitions. Des stages sont déjà programmés pour le dernier week-end de mars et les trois premiers d'avril, à quoi s'ajouteront des stages à Lyon, Paris, Bouresse et en Bretagne. Cela représente pour Marcelo et Fabrice un travail considérable. Il aurait fallu préparer un spectacle avec mise en scène pour le dimanche soir, mais ce sera impossible.

Au minimum nous devons être tous présents à Limoges les 18-19 avril.

Pour chanter dans la rue, il n'est pas nécessaire d'être inscrit au congrès.

## **Le site des Kompanoj**

**Yannick** présente le site. Voir p.7.

Le site d'Espéranto-Gironde est pour l'instant juste en préparation.

Après le repas nous répétons, accompagnés par Isabelle, plusieurs chansons.

La journée s'achève par un diaporama proposé par Yannick et Janine sur leur séjour en Argentine à l'occasion du congrès de Buenos Aires en juillet-août derniers.

**Janine**

# L'espéranto, langue vivante

La Journée universelle de l'espéranto a lieu le 15 décembre. Zoom sur l'association girondine qui promeut cette langue facile à apprendre.

« *Mi deziras kafon kun lacto.* » Pour commander son noisette à la terrasse d'un café, Bernard Sarlandie n'a pas utilisé l'espéranto. Il faut dire que le président de l'association Espéranto Gironde ne se sert pas de cette langue au quotidien, même s'il se dit convaincu que l'on y viendra tôt ou tard. « *L'espéranto pourrait être un instrument formidable pour l'Europe, plaide-t-il. Cette langue neutre, qui ne se veut pas hégémonique, ferait économiser des milliards d'euros en traduction et réduirait un peu la domination écrasante de l'anglais.* »

L'ancien prof... d'anglais, ex-principal de collège, est un espérantiste convaincu, depuis qu'il s'est familiarisé, à la fin des années 70, à cette seule langue internationale parlée sur les cinq continents, dans 120 pays, par 3 à 5 millions de personnes. Quand il rejoint Espéranto Gironde, l'association réunit près d'une centaine d'adhérents ; elle en rassemble moins de la moitié aujourd'hui. Un léger déficit de notoriété qui n'entame en rien l'enthousiasme de Bernard Sarlandie : « *Nous assurons des cours tous les lundis à Palmer, à Cenon, occasionnellement à Sainte-Foy-la-Grande, à Pessac et sur le Bassin ; nous préparons le 100<sup>e</sup> congrès à Lille prévu l'été prochain, où nous participerons à l'animation*



**Bernard Sarlandie, président de l'association Espéranto Gironde.**

Ph GP

*musicale... en espéranto bien sûr ; nous travaillons sur la traduction du Roman de Renard et sur un guide touristique girondin.* »

Celui qui a pris l'habitude de voyager via le réseau mondial des espérantistes est intarissable sur cette langue « *musicale, logique, évolutive, universelle, facile à apprendre* », avec ses 16 règles de grammaire et son vocabulaire de base à 600 radicaux. « *Six mois d'apprentissage de l'espéranto correspond à plus de deux ans pour l'anglais* », affirme le président d'une association qui s'inscrit dans le sillage de Sat-Amikaro, censée à l'origine promou-

voir l'espéranto comme un moyen d'émancipation des travailleurs.

Un vent d'idéal de justice et de fraternité a toujours soufflé sur la langue inventée par Zamenhof, un jeune médecin polonais confronté aux conflits ethniques dans la Varsovie de la fin du XIX<sup>e</sup>. Bernard Sarlandie espère que l'Éducation nationale reconnaîtra un jour l'espéranto, avec une option facultative au bac. Une pétition en ce sens, soutenue par feu Albert Jacquard et d'éminents linguistes, a recueilli plus de 30.000 signatures en mars dernier.

Guillaume PANTAIGNAN



# La retejo de La Kompanoj

The screenshot shows the website 'La Kompanoj' with a navigation menu and a list of songs. The navigation menu includes: Accueil, Iom da historio, Pasintaj spektakloj, La Lilla projekto, Novaĵoj, Ligiloj, and Kontakto nin. The 'La Lilla projekto' menu item is highlighted. Below the navigation menu, there is a sidebar with a search bar and a list of menu items: Accueil, Iom da historio, Pasintaj spektakloj, La Lilla projekto, La kanzonoj, Novaĵoj, Ligiloj, and Kontakto nin. The main content area is titled 'Listo de la kanzonoj' and contains a table of songs with columns for 'TRADUKITITOLO', 'TRADUKINTOJ', 'ORIGINALA TITOLO', and 'AŬTOROJ / KANTINTOJ'. Below the table, there is a text box with instructions on how to use the list.

Accueil Iom da historio Pasintaj spektakloj **La Lilla projekto** Novaĵoj Ligiloj Kontakto nin

Venue #185 KT - Accueil > La Lilla projekto > La kanzonoj

Accueil

Iom da historio

Pasintaj spektakloj

La Lilla projekto

La kanzonoj

Novaĵoj

Ligiloj

Kontakto nin

Listo de la kanzonoj

Per : Yannick  
Publiĝ : 26a novembro  
2014.

Por vidi aŭ elŝuti la tekstojn, partiturojn, muzikojn de la kanzonoj, alikliku la titolojn en la unua kolumno. Se vi deziras aŭskulti la originalajn versiojn de la kanzonoj ĉe Youtube, alikliku la titolojn en la tria kolumno. Se vi bezonas alitonaligitajn partiturojn (unu tonalon pli alte), vi povas elŝuti ilin el tiu paĝo.

| TRADUKITITOLO           | TRADUKINTOJ                       | ORIGINALA TITOLO                 | AŬTOROJ / KANTINTOJ          |
|-------------------------|-----------------------------------|----------------------------------|------------------------------|
| Estas ĝoj' verda        | Marcelo                           | Y a d' la jole                   | Charles Trenet               |
| Irlanda balado          | Marcelo / Silĉjo Barier           | Ballade Irlandaise               | Bourvil                      |
| Jen via mondo           | Wouter Pilger                     | This land is your land           | Woody Guthrie                |
| Kiam regos am' sur ter' | Georges Lagrange                  | Quand les hommes vivront d'amour | Raymond Levesque             |
| Kiam restas am' nur     | Georges Lagrange / Marcelo / Famo | Quand on n'a que l'amour         | Jacques Brel                 |
| Kisu min ankoraŭfoje !  | R. Schwartz                       | Le p'tit quinquin                | A. Desrousseaux              |
| La dizertonto           | Georges Lagrange                  | Le déserteur                     | Boris Vian                   |
| La esper' senlima       | Jo-Petro Danvy                    | L'espérance folle                | Guy Beart                    |
| La festo                | Marcelo                           | La fête                          | Michel Fugain                |
| La kongresurboj         | Jo-Petro Danvy                    | Les petits patelins              | F. Mallet-Joris / M-P. Belle |
| La nord-irlanda balado  | Marcelo / Silĉjo Barier           | La ballade nord-irlandaise       | Renaud                       |
| La tempo ĉeriza         | Lagrange / Marcelo / Famo         | Le temps des cerises             | J-B. Clément                 |
| Lili                    | André Cherpillod                  | Lily                             | Pierre Perret                |
| Majorana                | Marcelo                           | Marjolaine                       | Francis Lemarque             |
| Milva amuz'             | Silĉjo Barier / Marcelo           | Les comtes                       | Diane Burkhale               |

**M**eze de januaro, ni anoncis per diversaj retaj inform- kaj diskut-listoj la naskiĝon de la oficiala retejo de La Kompanoj, ĉe la adreso lakompanoj.free.fr Ekde tiam, ĝi ricevis pli ol 600 vizitoj, tio estas meznombro po 24 vizitoj ĉiutage, kun pinto de 68 vizitoj la 18an de januaro. Ĝia referenco jam aperas unualoke en la serĉmotoroj Bing kaj Yahoo (nur duapage en Google) per la serĉvorto «kompanoj», kaj unuapage en la tri motoroj per «kanzonoj».

Ĉar plej urĝis disponigi al la publiko materialon por trejniĝi cele al la surstrata kunkantado en Lillo, ni unue prilaboris la du rubrikojn en rilato kun tiu evento:

- La rubriko «La Lilla projekto», kiu konstituas ankaŭ la hejmpaĝon de la retejo, prezentas la projekton, kaj ebligas, dank' al 18 alklakeblaj vinjetoj, aliron al ĉiu el la 18 kanzonopaĝoj. Por ĉiu kanzono aperas la teksto, kaj alklakeblaj ikonoj ebligas elŝuti la tekston kaj la partituron pdf-formate, kaj la muzikon midi-formate. La subrubriko «La kanzonoj» prezentas en tabelo la detalojn de la 18 kanzonoj (Vd. foton ĉi supre). Alklako de la esperanta titolo ebligas aliron al la rilata paĝo, kaj alklako de la originala titolo ebligas aŭskulti la originalan kanzonon ĉe Youtube.

- La rubriko «Novaĵoj» anoncas la diversajn staĝojn kaj provkantadojn, kiu okazos en diversaj lokoj por prepari la Lillan eventon.

- La aliaj rubrikoj, pri la historio kaj la pasintaj spektakloj de La Kompanoj, ĉar malpli urĝaj, daŭre estas prilaborotaj... Sed vidu mem!

**Yannick**

Cvjatko Todorov, bulgara korespondanto de Monique, prezentas libron:

## ANTAŬPAROLO DE LA LIBRO

Pasintjare aperis en *Beletra Almanako* mia poemo *DIALOGO*.


Mia edzo tradukis ĝin en la italan lingvon. Poste du amikoj surprizis min sendante la tradukojn en hungaran kaj rumanan. Havante tri diverslingvajn versiojn bizara ideo naskiĝis en mia kapo: aperigi libron kun mia poemo en multaj diversaj lingvoj.

Nun la libro aperas, danke al miaj personaj geamikoj kaj al helpemaj UEA delegitoj. Ankaŭ ĉi tiu libro pruvas la nekompereblajn helpemon kaj lingvo-kapablon de la Esperanto-parolantoj.

Krom en la originala versio, *DIALOGO* fine aperas en 52 lingvoj.

Sincere mi dankas al ĉiuj helpemaj kontribuintoj.

**2012 Júlia SIGMOND**, aŭtoro de la libro



**Júlia Sigmond** estis pupaktorino de la hungarlingva sekcio de la pupteatro de Cluj-Napoca, Rumanio, kunlaborantino ankaŭ en la internacia lingvo ĉe la prezentado de marionetteatraĵoj okaze de internaciaj renkontiĝoj. Ŝi esperantiĝis en 1956. Aŭtoro de rakontvolumo en esperanto titolita *Mi ne estas Mona Lisa* aperinta en 2001. Redaktoro de revuo *Bazaro*. Ĉefredaktinto de la libro *Kiam mi estis la plej feliĉa en la vivo* (2008), enhavanta kontribuaĵojn al la samtitola rubriko en *Bazaro*. Ŝi regule kunlaboris en la magazino *Monato*.

*El Vikipedio*

2008

## GRAVAJ INFORMOJ

• La kotizoj ne ŝanĝiĝas por 2015:

**ESPERANTO-GIRONDE: 17 € por unu persono – 23 € por paro**

**SAT-AMIKARO: 35 € por kotizo kaj abono – 14 € por kotizo sen abono**

Monique, nia kasistino, atendas vian pagon!

• Nia venonta kunveno okazos **dimanĉon la 15an de februaro** en la kulturcentro **Palmer en Cenon**.



## NIA VIZITO ĈE «PARADIZO TUJ»

Dimanĉon la 19an de oktobro ni vizitis René Damarin en Léognan.

**M**ulte plaĉis al mi la vizito al Renato Damarin. Li multe parolis pri sia esperantista vivo; li montris malnovajn kongresfotojn; li humure rakontis pri siaj diversaj spertoj; li multe ŝercis. Eĉ maljuna, li ankoraŭ estas tre vigla mense kaj fizike, eble dank' al sia sana vivmaniero.



De longe li estas anarkiisto, libervivulo, mediprotektanto kaj tute ne ŝatas nian modernan konsumad-socion. Liaj ideoj kongruas kun tiuj de la terkulturisto, filozofo kaj verkisto Pierre Rabhi, kiu rekomendas la «feliĉan sobrecon».

Lia revo estis, kaj ankoraŭ estas, akcepti homojn por kune prilabori la grundon kaj vivi preskaŭ aŭtarcie.

Ŝajnas ke la bieno duone apartenas al li kaj duone al la asocio

«Paradizo tuj». Pere de tiu asocio multaj esperantistoj mone helpis lin, antaŭ 30 jaroj, kiam la kunulino foriris. Eble, denove, la esperantistaro povos helpi lin; sed ĉi foje por trovi solvon por la estonteco de tiu bieno.

Ĉiaokaze, mi denove vizitos Renato-n kun plezuro.

*Joël*

**R**enato, libereca pensmanierulo, timas, sen klare tion esprimi, pri la estonteco de «Paradizo Tuj», kiam li foriros. Sen propra familio, li deziras, ke tiu kolektiva organizaĵo ne malaperu aŭ ke la ŝtato heredu lian bienon.

Estus bone, ke la esperanta movado helpu lin sen tro atendi. Sed, kiamaniere? ...

*Gloria*



*Domo de la asocio «Paradizo Tuj»*

**K**un ĝojo, ni retrovis denove Renato-n samstate kiel ni lasis lin, jam plurajn jarojn antaŭe, kvazaŭ estus hieraŭ.

En tiu varma posttagmezo de mez-oktobro, li vigle rakontis pri sia esperanta vivo kaj eĉ persona. Tamen li montris malkvieton, kiam li menciis malsukceson trovi, por longdaŭra tempo, kunulojn pretajn vivi laŭ lia vivmaniero, kaj demandis sin, kia povas esti la estonto de lia asocio.

Ni ne rajtas konsili lin enmiksigante en lian vivon. Tamen ĉiuj vojoj devas esti esplorotaj.

Povas esti ke li finfine trovos tiujn, kiujn li serĉos. Eble ne.

Do, ni devas serĉi la plej bonajn solvojn.

- Inter ili, la asocio *Terre de Liens*, kiu zorgas pri instaligo de junaj terkulturistoj laŭ naturaj metodoj povas esti interesata, ĉu pri la tereno, ĉu pri la domo, ĉu ambaŭ.

- La domo povas fariĝi alternativa asocio-domo por la asocioj, kiuj ne trovas lokon por renkontigi siajn membrojn.

Jen du ideoj. Ĉiuj povas aldoni aliajn....

**Bruno**

**D**imanĉon la 19an de oktobro ni vizitis René Damarin en Léognan, apud Bor-do, kaj la domon de la asocio «Paradizo Tuj», kiun li kreis en 1969.

Li tre agrable akceptis nin, pre-parinte apetitvekajn manĝaĵojn, kiuj enhavis nuksojn, poreojn, pomojn, k.t.p. el lia ĝardeno.

Post la vigliga kaj verve humura manĝo, ni promenis ekstere, sub varma suno, kaj konatiĝis kun Violine, la tirĉevalino, kiu havas feliĉan vivon en duon-libereco.



La tereno, 6.000 m<sup>2</sup>-vasta, tute senkultura de post pluraj jaroj, postulas multe da laboro, same kiel la domo.

René Damarin, nun aĝa viro sed ankoraŭ vigla, certe margĝenulo sed alloga kaj ĉiam entuziasma, ŝatus ke tiu asocio pludaŭru. Pro tio li ŝatus trovi novajn fortojn ĉe viroj, virinoj, pretaj asisti lin en unua tempo, kaj anstataŭi lin en dua tempo.

**Monique**

**ESPERANTO GIRONDE**  
**KUNVENO DE LA 12a de JANUARO 2015 je la 14a**  
**REĜFESTO**

**Ĉeestas:** Marcelo, Claudine, Monique, Bernard Vidal, Jean-Seb, Janine, Yannick, Elvezio, Marie-Thérèse Guillaume, Andreo, Christiane, Michel.

**Senkulpigitaj:** Marie-Thérèse Lafage, Joël.

**1. Marcelo** bonvenigas ĉiujn kaj prezentas la tekston de Thomas Sankara, *Diskurso pri ŝuldo*, pri kies traduko zorgis la grupo dum la lundaj renkontoj.

La teksto estas eltiraĵo el la libro *Discours sur la dette*, eld. Elytis. La diskurso estas facile trovebla ĉe la reto.

**Claudine:** La teksto estas de 1987 kaj estas fakte tute aktuala. Nenio evoluis rilate al la interŝanĝoj inter la nordo kaj la sudo.

La diskurso temas pri la ŝuldo de la afrikaj landoj ĉe la Monda Fonduso, kiun ili ne povas repagi. Thomas Sankara proponis al sia lando ne plu dependi de la eksterlanda helpo. Li

montras, kio estas imperiismo. Afrikanoj produktas ne por si mem kaj aĉetas rizon el Japanio.



Ni kune legas kaj komentas kelkajn partojn.

**2. Yannick** informas pri la nuna stato de la retejo de la Kompanoj:

<http://lakompanoj.free.fr>. (vd. p.7)

La hejmpaĝo ebligas atingi ĉiujn kanzonojn kun bildoj, kaj proponas aliron al la PDF-formataj tekstoj kaj partituroj. Same eblas aŭskulti la midi-muzikon. La 18 kanzonoj estas nun pretaj, kaj tiu parto de la retejo estas finpreta.

Do ĉiuj konsideras, ke nun la retejo povas esti publikigita.

**Yannick** atendas artikolojn pri la historio de la pasintaj spektakloj. **Monique** donas al Janine libretojn pri la historio de la Esperanta movado en Bordojo, kaj **Marcelo** jam pruntedonis dosierojn pri antaŭaj spektakloj. Do la laboro estas farenda.

Pri la antaŭaj spektakloj, se oni intencas publikigi la tekstojn kaj muzikojn de la kanzonoj, oni unue kontrolu, ke la aŭtoroj ĝin permesas.

Sed ne tro gravas: se la aŭtoroj ne konsentas pri la publikigo, ili nur postulos, ke oni forigu la tekstojn aŭ muzikojn el la retejo.

**Marcelo** informas, ke la **21an de aprilo**, en la Nacia Esperanto-Muzeo de **Gray**, okazos de la 10a horo ĝis la 17a la provkantado, kaj vespere la jarkunveno de AF-CE. La kontakto por Gray estas Roland Cuenot, kies retadreso estas jena:

[roland.cuenot@gmail.com](mailto:roland.cuenot@gmail.com)

La responsulino por **Grésillon** estas **Isabelle Nicolas**. Tiu por **Limoges** estas **Isabelle Jacob**. (Por pliaj informoj vidu la retejon lakompanoj.free.fr )

Sur la retejo de La Kompanoj aperas ligiloj al tiuj de Espéranto-Gironde (nun konstruota), de Lillo 2015, de SAT-Amikaro, de Esperanto France. Aldonotaj, tiuj de Grésillon kaj Kvinpetalo. La kontaktoj por la retejo de La Kompanoj estas Marcelo kaj Claudine.

**Yannick** montras la «fulminformojn» (« brèves ») kaj rimarkigas, ke sur la Lilla paĝo aperas subrubriko: listo de la kanzonoj, kiu ebligas aliron al ĉiuj kanzonoj. Marcelo verkos teksteton kiel enkondukon.

Yannick zorgos pri la dissendo de la adreso de la retejo al la diskutlistoj.

Oni povus meti en la retejon de Espéranto-Gironde la jam pretajn slipojn de TGL. Monique povas sendi tiun pri la marĉoj, por ke ĝi estu PDF-igita.

### 3. Diversaĵoj

- **Monique** informas, ke Louise de deziras donaci siajn librojn. Janine kaj Yannick informos Claude Nourmont por eventuala donaco al Kvinpetalo.

- **Elvezio** deziras krei Esperanto-kurson en la universitato. Plej bona solvo estas krei klubon aŭ asocion laŭ leĝo de 1901.

Janine sugestas krei grupon dependan de Esperanto-Gironde, jam ekzistanta asocio.

- **Bernard** sendos sian ludon «Metamorfozo» al UEA por peti la permeson ĝin vendi dum la UK. En marto, li sendos reklamon al UFE kaj SAT-Amikaro.

Post la fino de la kunveno salute aperas (kaj glute malaperas) la reĝkukoj kun bonaj trinkaĵoj, per kiuj ni plej plezure finas la posttagmezon.

*Janine*



*Gereĝoj de la festo!*

## STAĜOJ



**2015-apr-03/08:**

Renkontiĝo de Interkant' kaj kunkantado kun La Kompanoj

**2015-apr-17/25:**

PRINTEMPaS, intensivaj kursoj kun Zs. Korody, Ch. Chazarein, M.

Quenut

**2015-apr-25/26:**

PRINTEMPaS, internaciaj KER-ekzamenoj (B1, B2, C1) -

**M.C.E. Château de Grésillon, St. Martin d'Arcé 49150 BAUGÉ-EN-ANJOU**

Tel.: 02 41 89 10 34 (aŭ 09 51 64 10 34) - Informoj: gresillon.org



**Febr. 23a-27a: Praktikado de la lingvo plurnivela**

Koncernas komencantojn, progresantojn (2a grado kaj pli...); trejnado pri instruado de Esperanto al komencantoj. Studado en etaj grupoj, adaptita pedagogio, familieca etoso. Familioj kun infanoj bonvenaj. Gvidos A.-S. Markov.

Eblos trapasi la ekzamenojn de FEI post la fino de la staĝo sabaton, la 28-an.

**KVINPETALO Esperanto-Centro, 4 rue du Bureau 86410 BOURESSE**

Tel.: 05 49 03 43 14 (aŭ 06 07 31 67 81) - Informoj: kvinpetalo.org

### NIAJ KURSOJ

- A **GUJAN-MESTRAS**, le jeudi de 15h à 17h, cours pour débutants, au-dessus du centre St Exupéry, face à la gare SNCF. (06 95 02 85 00)
- A **CREON**, le jeudi tous les 15 jours de 14h à 16h, cours pour débutants chez Moline STRIDE, 17 rue Voltaire. (06 10 07 08 58)
- En **GALGON**, ĉiun lundon de la 17a 30 ĝis la 19a 30, Joël LAJUS gvidas kurson por komencantoj kaj progresantoj. (05 57 69 26 96)
- En **CENON** (Kastelo Palmer), ĉiun lundon inter la 14a kaj la 17a, Marcelo REDOULEZ gvidas traduko-grupon. (05 56 21 38 64)
- En **MONTENDRE**, ĉiun mardon de la 10a ĝis la 12a, Janine Dumoulin gvidas kurson por ĉiuj niveloj. (05 46 49 45 18)



## **Kiel Renardo eniris la biendomon de Constant Desnois; kiel li forportis la virkokon Klarkant', kaj kiel li ne manĝis lin (daŭrigo)**

**K**ien li iras?  
-- Tiudirekten, rigardu foren, ĉu vi vidas lin?

Tiam Renardo transpasis la heĝojn, sed la kamparanoj aŭdis lin fali aliflan-  
ken kaj ĉiuj ekpersekutis lin. Constant Desnois malligas sian dikan dogon Misnaj-  
bar'. Oni retrovas la spuraron, oni alproksimiĝas, oni tuj atingos lin. «La vulpo! La  
vulpo!». Des pli rapide kuris Renardo.

-- Moŝto Renardo, tiam diras la kompatinda Klarkant' per tremanta voĉo, ĉu vi la-  
sos tiujn kamparanojn tiel grumbladi? En via situacio, mi venĝus min kontraŭ ilin,  
kaj miavice primokus ilin. Kiam Constant Desnois diros al siaj servistoj «Renardo  
forportas lin», vi respondu «Spite antaŭ via nazo kaj malgraŭ vi». Nur tio silentigos  
ilin.

Oni ja ofte diris: ne ekzistas saĝulo, kiu neniam malsaĝas. Renardo, la univer-  
sala trompisto, ĉi tiam estis mem trompita, kaj kiam li aŭdis la voĉon de Constant  
Desnois, li plezure respondis: «Jes, kamparanoj, mi forportas vian kokon, kaj mal-  
graŭ vi». Sed Klarkant', tuj post kiam li ne plu sentas la premon de la dentoj, pena-  
das, eskapas, svingas la flugilojn, kaj jen li sur la altaj branĉoj de najbara pomarbo,  
dum, ĉagrensurprizita, Renardo reen iras kaj komprenas la neripareblan stultaĵon,  
kiun li faris.

-- Ha, mia kara kuzo, diras la koko, jen la tempo pripensi la ŝanĝiĝojn de la ŝanco.  
-- Malbenita estu la buŝo, kiu decidas paroli, kiam ĝi devas muti, diras Renardo.  
-- Jes, respondas Klarkant', kaj la malsano krevu la okulon fermotan, ĝuste kiam ĝi  
devus malfermiĝi pli larĝe ol neniam. Vidu, Renardo, ĉiam malprudenta estos tiu,  
kiu senprave kredos vin: al diablo via kuzeco! Mi travivis la momenton kiam mi es-  
tis multekoste pagonta ĝin; sed al vi, mi konsilas rapide forkuri, se vi domaĝas vian  
vicon.

Renardo ne perdis tempon respondi. Densa vepro ŝirmis lin de la ĉasantoj. Li  
foriris, kun trista animo kaj malplena stomako, dum la koko, longe antaŭ la reveno



de la kamparanoj, ĝoje reatingis la korton, kaj per sia ĉesto, rekvietigis tiom da amikinoj, kiujn lia malfeliĉo dolore afliktis.

**FINO**



*Desegnis Morin'*

BOB

## Anonco

**E**SPERANTO-GIRONDE pretas eldoni sian duan **Kompakt-Diskon!** La Kompanoj registris sian unuan KD-on «Survoje» en 1999 kaj tiel partoprenis en la *Kolekto 2000* de Vinilkosmo.

Ĉi jare, niaj Kompaninoj **Morine Stride kaj Isabelle Diaz** engaĝiĝas en nova projekto: registri lirikaĵojn!

Venu aŭdi pri tiu projekto kaj kundecidi pri ĝia efektivigo okaze de la venonta kunveno de Esperanto-Gironde, la **15an de februaro!**

Morine prezentos la artan enhavon – 12 kanzonoj inter kiuj *Ho kara vi* (Giodani), *La vojoj de l' am'* (Poulenc-Anouilh), *Kiam regos am' nur* (Brel), *La rozo* (Bette Midler) – kaj Marcelo argumentos la bezonatan buĝeton...

Kiel nomiĝos tiu duopo? Kiel titoliĝos tiu albumo? Ĉu vi disponas pri fotoj uzindaj por ilustru tiun albumon? Ĉu vi havas ideojn rilate tiun konkretan agon? Ne hezitu sugesti kaj pli riĉigi tiun novan projekton de ESPERANTO-GIRONDE!

**ESTRARO**  
**de**  
**« ESPÉRANTO-GIRONDE »**

\* \* \* \* \*

Centre Culturel Château Palmer  
33150 CENON  
Banque Postale:  
347771 F Bordeaux

\* \* \* \* \*

Prezidanto: **Bernard SARLANDIE**

24, rue des Bosquets de Venteille  
33185 LE HAILLAN

Tel: 06 83 29 40 13 / [bernard.sarlandie@gmail.com](mailto:bernard.sarlandie@gmail.com)

Sekretariino: **Janine DUMOULIN**

2, chemin des Nauves

Chardes 17130 MONTENDRE

Tel: 05 46 49 45 18 / [janinedum@neuf.fr](mailto:janinedum@neuf.fr)

Help-sekretariino: **Morine STRIDE**

Kasistino: **Monique DUSSENTY**

76 avenue La Fontaine

33560 CARBON BLANC

Tel: 05 56 06 74 49 / [monique.duss@free.fr](mailto:monique.duss@free.fr)

\* \* \* \* \*

Materialon por LEGI bv. sendi al la sekretariino aŭ al:  
Yannick DUMOULIN —> [yannickdum@free.fr](mailto:yannickdum@free.fr)

